V. ADORATSKIJ

M 213/1295

KIO ESTAS MARKSISMO KAJ LENINISMO

EKRELO—1932 - LEIPZIG

V. ADORATSKIJ

M 213/1295

KIO ESTAS MARKSISMO KAJ LENINISWO

32-56364

EKRELO 1932 LEIPZIG

El rusa lingvo tradukis F. Robiĉek
Lingve kontrolis E. Drezen

KIO ESTAS LA SCIENCA KOMUNISMO.

La scienca komunismo estas komunismo bazata sur la rigora scienco kaj sur la klasbatalo, sed ne simple sur la bonaj intencoj. La scienca komunismo formiĝas en la reala batalo de la nuntempa laboristaro kontraŭ la burĝaro kaj en la konscia gvidado de tiu batalo, efektivigata de komunista partio sur la bazo scienca.

Kondukantaj tian batalon organizitaj laboristoj kaj taĉmentoj de l'vastaj amasoj povas kaj devas, laŭ la esprimo de Lenin, «kombini la gigantan pasion en grandega revolucia milito kun la plej trankvila kaj sobreca prikalkulo» de la situacio, de la cirkonstancoj de batalo. Tiu batalo estas neordinare komplika: ĝin partoprenas multmilionnombra amaso, sed ne ĉiuj samtempe ekatakas la komunan malamikon, la organiziteco kaj konscieco de batalanta amaso estas diversa, samkiel diversa estas ankaŭ la skalo de kultureco kaj organiziteco de la malamiko. Ĉi tial klaras la tuta graveco de firma, sobreca, trankvila, konscia, scienca gvidado de la batalo. «Sen revolucia teorio ne eblas la revolucia movado», diris Lenin. Oni ne povas gvidi la amasan bataladon de la proletaro, ne antaŭvidante tion, kiel devas agadi la klasoj, kiel estas disvolviĝonta la batalo. Tian antaŭvidon donas la scienco. Nur la revolucia scienco, sintezanta la sperton de revolucia batalo de proletaro tutmonda, helpas kompreni la internajn interligojn de la okazantaĵoj, kompreni ne nur tion, «kiel kaj kien moviĝas la klasoj nuntempe, sed ankaŭ tion, kiel kaj kien devos ili moviĝi estonte». (Stalin, «Pri la fundamentoj de leninismo»).

La teoriaj fundamentoj de scienca komunismo (markismo) estis kreitaj de Marks kaj Engels kaj praktike kontrolitaj de la laboristaro kaj de ili mem dum ilia daŭra

revolucia agado. Marksismo formiĝis dum la tempo, kiam laboristaro en kelkaj landoj, komence en Anglio kaj Francio, kaj poste ankaŭ en Germanio komencis agadi kiel memstara forto (komence de 30—40-aj jaroj de la XIX jarcento). La tuta grandega sperto de la proleta klasbatalo estis taksita kaj komentita de Marks kaj Engels en iliaj verkoj, kie ili klarigis al la proletaro «la kondiĉojn kaj esencon de ĝia propra agado» (Engels. Anti-Düring) Marks kaj Engels estis intime kunligitaj kun la laborista movado kaj ĉiam ĝin senpere partoprenis. La verkaro de Marks kaj Engels estas trezorujo de l'scioj, necesaj al proletaro, helpantaj ĝian batalon.

Lenin estis daŭriganto de l'afero de Marks en novaj cirkonstancoj. Tio, ke Lenin vivis kaj agadis en novaj, aliiĝintaj cirkonstancoj, estas respegulita en la enhavo de la teorio. Uzante sciencon, kreitan de Marks, Lenin solvis novajn problemojn, pluen disvolvis kaj pliriĉigis la instruon de Marks sur la bazo de nova sperto, akirita en vico de revolucioj. Leninismo estas la sama marksismo sed en novaj kondiĉoj de ankoraŭ pli matura kapitalismo kaj komenciĝinta sociala revolucio.

Sed kio do estas la esenco de marksismo?

Instruo marksisma kreskis sur la grundo de progresado de kapitalismo kaj neeviteble deper ĝi estigata klasbatalo de la proletaro. Engels kaj Lenin, skribintaj pri la instruo de Marks, indikis tri fontojn kaj tri konsistajn partojn de marksismo: filozofio, politika ekonomio kaj socialismo. Ni aparte pritraktos ĉiun el ĉi fontoj.

Dialektika materialismo

Filozofio estas scienco, studanta la leĝojn de pensado (logiko kaj dialektiko). Iam la filozofio estis opiniata kiel ĉion entenanta scienco de l'sciencoj, eltrovanta senŝanĝajn, foje por ĉiam konstatitajn aksiomojn. Marksismo refutis tiun koncepton.

«La moderna materialismo,— skribis Engels en «Anti-Düring»,—estas laŭesence dialektika kaj ne bezonas plu iun starantan super la aliaj sciencoj filozofion. Se oni postulas de ĉiu scienco klarigon de ĝia loko en la ĝenerala kunligo de objektoj, ĉiu speciala scienco pri tiu kunligo malnecesiĝas. De l'antaŭa filozofio tiuokaze restas kiel memstara scienco nur la instruo pri pensado kaj ties leĝoj — formala logiko kaj dialektiko. Ĉi cetera eniĝas en la pozitivan sciencon pri naturo kaj historio».

La filozofio donas ĝeneralan koncepton, ĝeneralan traktadon al la studado (la metodon), instruas, kiel oni deves pli ĝuste reflekti en konceptoj la efektivan kunligon kaj movadon de l'ekstera mondo, ĝian progresadon.

La filozofia bazo de marksismo estas materialismo.

Materialismo en la senco filozofia konstatas, ke ekster ni ekzistas m a t e r i a l a m o n d o (t. e. homsocio kaj la tuta nin ĉirkaŭanta naturo), perceptata de nia konscio kaj tiamaniere difinanta nian konscion. Tial ĉi materialismo estas senindulge malamikeca al ĉiu kredo je supernaturaj fortoj kaj dio. La merito de Marks konsistis en tio, ke li kunigis la materialismon kun dialektika metodo de Hegel kaj kreis tiamaniere dialektikan materialismon.

Hegel konscie aplikadis la dialektikan metodon. Ĉiun fenomenon li rigardis el la vidpunkto de ĝia evoluado (deveno, ŝanĝoj kaj transiro je alia fenomeno). En unu el siaj verkoj li, ekzemple, traktante la rilaton de sklavismo, rigardas ĝin historiece el la vidpunkto de ĝia evoluado. Antaŭ ĉio li starigas la demandon pri la deveno de tiu rilato. Anstataŭ ol perei en batalo, la kapitulaciinto aĉetas al si vivon per la valoro de sklaviĝo. La sklavo estas senigata de memstareco, de sia volo, li plenumas la volon de sinjoro tute lin sklaviginta. Sinjoro laborigas sklavon, kaj tiu laboro, la prilaborado de objektoj estas lernejo, transformanta la homon sklavigitan kaj la sklavisman liraton mem. La sinjoro perdas kapablon administri objek-

tojn, fariĝas ĉi rilate senhelpa, dependanta de sia propra sklavo, kaj sklavo fariĝas sinjoro de sia sinjoro. Sur ĉi malgranda ekzemplo (oni povus citi multe da ili) ni vidas la specifikecon de Hegel'a traktado, postulanta diversflankan esploron de la evoluado de objekto kaj de ĉiuj en ĝi ekzistantaj kontraŭdiroj. Sed mem Hegel povis fari tion ne ĉiam sufiĉe konsekvence.

La ĝenerala principo de liaj studmetodoj estis ĝusta, sed revoluciajn konkludojn el sia studo li ne faris.

La kaŭzon de l'progresado Hegel serĉis ne en iu ekstera forto, sed en kontraŭdiroj, estantaj en la naturo de ĉiuj fenomenoj, en ili mem. Ekzemple. Hegel mokis tiujn homojn, kiuj intencis kuraci la socian malbonon per predikoj kaj mem samtempe estis flanke de la ĉiutaga vivo kaj de la batalo de ĉiu socio. Venki tiun aŭ alian socian malbonon eblas, laŭ la opinio de Hegel, nur per la kreskanta en batalo kun tiu malbono interna forto de l'socio. Tia koncepto neeviteble sekvis el la esenco mem de Hegel'a metodo, nomata de li dialektika (t. e. historia kaj laŭ sia esenco revolucia, vidanta la kaŭzon de la movado en internaj kontraŭecoj).

Sed Hegel estis idealisto. Li opiniis, ke la ideo (t. e. penso, konscio) estas la bazo por ĉio, estas la ĉefa kialo de progresado. La nivelon de progresiteco de la mondhistorio Hegel, ekzemple, mezuris per la nivelo de la progresiteco de spirito. Kaŭzon de tiu aŭ alia socia ordo li vidis en la nivelo de progresiteco de homa memkonscio. Juna Engels, antaŭ ol li fariĝis materialisto, estis disĉiplo de Hegel.

En unu el siaj fruaj artikoloj li skribis, esprimante la vidpunkton de Hegel:

> «La antikveco nenion ankoraŭ sciis pri la rajto de persono kaj tuta ĝia mondkoncepto estis abstrakta. Tiakaŭze la antikveco ne povis ekzisti sen sklavismo».

Jen estas specimeno de pure idealisma percepto: sociaj interrilatoj dependas de la nivelo de progresiteco de konscio.

Fariĝinte materialistoj Marks [1] kaj Engels agnoskis, ke la bazo de ĉio estas ne ideo, sed la ekster nia konscio kaj de ĝi sendepende ekzistanta materiala mondo. Niajn pensojn Marks opiniis respegulo de tiu ekstera mondo en nia konscio. La kapablon pensi li opiniis eco de nia cerbo, t. e. de la sama materio. Ankaŭ la socian ordon Marks klarigis per kaŭzoj materialaj. Sed pri ĝi temos en sekvonta ĉapitro. Kio koncernas la dialektikon de Hegel, Marks uzis ĝin materialisme. Male al Hegel Marks atentis tion, ke la esenco de la problemo estas en la kontraŭecoj de materiala mondo. [1]

Dialektika materialismo de Marks estas filozofia bazo por ĉiu studado kaj agado. Ĝi estas perfekta kondukanto ne nur por la esplorado de naturevoluado, homsocio kaj nia pensado, sed ankaŭ por ĉiuj branĉoj de praktika agado.

Engels plej komplete priskribis la esencon de dialektika materialismo en negranda sed abundenhava broŝuro «Ludvig Feierbah», kie li rakontas pri la embriiĝo de dialektika materialismo. En alia libro «Anti-Düring» pritraktinte la erarojn de nekonsekvenca materialisto Düring, retiriĝanta de materilismo al idealismo, Engels korektis ĉi erarojn kaj montris, kiel solvas la dialektika materialismo problemojn de filozofio, politika ekonomio kaj socialismo. Tri ĉapitroj de tiu lasta libro estis eldonitaj de Engels en aparta broŝuro titolita «Evoluado de socialismo de utopio al scienco».

Politika ekonomio

Rilate al la dua fonto de marksismo kaj dua ĝia konsista parto — la politika ekonomio, antaŭ ĉio ni devas diri, ke Marks, aplikante dialektikan materialismon al la studado de socio, eltrovis, ke la bazo de socia progresado estas progresado de la produktado. «La

[1] Marks komence ankaŭ estis disĉiplo de Hegel kaj idealisto.

materiala produktado estas la ĉefa ero de socia vivo, ĉar ĝi garantias la ekzistadon de la homoj. Por ekzisti, homoj antaŭ ĉio devas manĝi, trinki, havi loĝejon, sin vesti, kaj jam poste sin okupi je politiko, scienco, arto k. t. p.» (Engels). Necesaj por la ekzistado de homoj materialaj objektoj estas akireblaj el la nin ĉirkaŭanta naturo nur per laboro de la socio. Marks diris:

«En la produktado la homoj influas ne nur la naturon, sed ankaŭ unu la alian. Ili efektivigas la produktadon nur kune agante kaj interŝanĝante unu kun alia siajn agojn. Por produktadi, oni certamaniere interrilatas unu kun alia, kaj nur en la kadroj de ĉi sociaj interrilatoj estas plenumata la influo al la naturo kaj estas efektivigata la produktado. Konforme al la karaktero de la produktadrimedoj estas diversaj ankaŭ la sociaj interrilatoj, ekzistantaj inter la produktantoj kaj same estos diversaj la kondiĉoj, ĉe kiuj oni interŝanĝas siajn agojn kaj partoprenas la produktadan agadon prenitan tutece. Kun la invento de la nova milita armilaro, de la pulvarmilaro neeviteble ŝangiĝis la tuta interna strukturo, de la armeo, ŝanĝiĝis la interrilatoj, en kies kadroj apartaj homoj formas armeon kaj povas agi kiel armeo, kaj ankaŭ ŝanĝiĝis la rilatoj inter diversaj armeoj. Tiamaniere la sociaj interrilatoj, en kies kadroj la homoj produktadas, la sociaj interrilatoj produktadaj — ŝanĝiĝas, evoluas kune kun la evoluado kaj progresado de la materialaj produktadrimedoj, de la produktivaj fortoj. La tuta kompiekso de produktadinterrilatoj formas tion, kio estas nomata sociaj interrilatoj, socia ordo, kun specifa, sole al ĝi propreca karaktero, staranta sur certa ŝtupo de socia evoluado. La antikva socio, feŭdala socio, burĝa socio estas tiaj kompleksoj de produktadinterrilatoj, kaj samptempe ĉiu el ili okupas la lokon de aparta ŝtupo en la progresado de homaro.»

La antikva socio (socio de antikva Grekio kaj de antikva Romo) baziĝis sur la ekspluatado de sklavlaboro. La feŭdala — sur la ekspluatado de laboro servutula. La burĝa — sur la ekspluatado de laboro dunglaborista, kreanta alproprigatan de kapitalistoj plusvaloron. Ĉio ĉi estas klasaj socioj sur diversaj ŝtupoj de la progresado de materiala produktado. Batalo ekzistanta en la klasa socio en la sferoj politika, filozofia ktp. estas esprimo de batalo inter la sociaj klasoj. La ekzisto de ĉi klasoj kaj iliaj kunpuŝiĝoj estas difinataj, kiel diris Engels, deper ilia progresnivelo kaj ekonomia stato, deper la karaktero kaj metodoj de ilia produktado, kaj deper de ĝi dependanta produktinterŝanĝo.

Konsiderante, ke la produktadinterrilatoj estas la decidiga ĉefaĵo por tuta strukturo de l' socio, Marks precipe atentis la sciencon, studantan la socian strukturon de produktado, — la «politikan ekonomion», — la sciencon pri la leĝoj de la produktado kaj interŝango de la materialaj vivbezonaĵoj en la homa socio (laŭ la difino de Engels). La antaŭuloj de Marks en ĉi kampo estis burĝaj teoriuloj-ekonomiistoj — Adam Smit kaj D. Rikardo. Ili donis sistemecan, sciencan, ĝenerale ĝustan bildon de ekzistleĝoj de kapitalisma sistemo. Aplikante sian metodon de dialektika materialismo al la esplorado de ekonomiaj interrilatoj, Marks klarigis la embriiĝon de kapitalisma sociordo, leĝojn de ĝia evoluado kaj transiro je alia. Li konstatis, ke en la burĝa socio en la formo de objektinterrilatoj (interŝanĝataj sur la merkato varoj) estas kaŝitaj interrilatoj de la homoj. Adam Smit kaj D. Rikardo defendis en siaj ekonomiaj verkoj ĝustan teorion — laboran teorion de valoro, kiun poste akceptis kaj materialisme disvolvis, definitive solvinta la enigmon de valoro, Marks. Valoro estas eco de objektoj (varoj) esti ŝanĝataj sur la merkato en certaj proporcioj. Ĝi estas mezurata per la kvanto de socie-necesa laboro uzata por la produktado de objekto. El ĉi tio devenas la nomo: labora teorio de

valoro. Ŝajnas, ke la interŝanĝa valoro estas la eco de objektoj mem, sed verfakte ĝi estas la respegulo deper objektoj de la interrilatoj de homoj — varproduktantoj, anoj de varŝanĝa socio. En varŝanĝa socio la homoj laboras por vendi produktojn sur la merkato. Diversaj entreprenoj estas interligataj unu kun alia nur per la merkato. Por la burĝa socio ekzistas neniu konscia direktado, neniu tuteca socia produktado. La sola interligo de apartaj entreprenoj estas merkato.

En la burĝa socio grandan potencon havas la mono. Ŝajnas ke tiuj malgrandaj objektoj (metalrondetoj) havas iun magian forton — liveri al homo ĉion necesan, kaj krom tio, liveradi profiton. Sed gravas ĉi tie certe, ne la objektoj, sed la interrilatoj, ekzistantaj inter la homoj. Esenca estas tio, ke la mizero igas homojn produktadi varojn, dunge labori ĉe entreprenisto, posedanto de produktadrimedoj, kies posedaĵo estas defendata per polico, malliberejoj, armeo kaj ĉiuj disponataj de la burĝaro rimedoj de la ŝtato. Se en burĝa socio ne estus merkato, ne estus proletaro, laboranta en la industriejo kaj kreanta varojn, se la entreprenistoj ne vendus ĉi tiujn varojn la mono havus neniun potencon. Oni nenion povus per ĝi aĉeti kaj neniu profito estus ricevebla.

La kamparana patriarka familio ne konis la merkaton. Ĝi produktis mem ĉion por sia uzado: ŝpinaĵon, tolon, grenon, bruton, vestaĵon ktp. Apartaj laborantoj laboris kiel anoj de unu organizaĵo, laŭ certa plano kaj la interrilatoj inter ili estis senperaj.

En la bienula naturmastrumo (naturmastrumo t. e. ĉion produktanta interne kaj neinon aĉetanta) la interrilatoj ankaŭ estis senperaj: la administranto sciis, kio de kiu estas postulenda, kamparanoj sciis, kiom la produktoj ili devas liveri al sia sinjoro.

En la burĝa socio ĉio estas produktata por la merkato kaj nenio estas transdonata senpere de la pro-

duktanto de iu objekto al la homo ĝin bezonanta. La interrilatoj inter homoj estas efektivigataj per merkato kaj akiras karakteron de interrilatoj inter varoj, inter objektoj.

La profiton al kapitalistoj kreas ne la mono. Ankaŭ la komercado povas nur transmeti la jam ekzistantajn riĉaĵojn el unu poŝo en la alian. La profito estas kreata dum la produktado per ekspluatado de dunglaboro. La profito de kapitalistoj ekzistas nur tial, ĉar sur la merkato estas varo, kies konsumado kreas plusprodukton. Tiu varo estas laborforto. Dum la kapitalismo la produktadrimedoj (iloj, maŝinoj, krudaĵo ktp.) fariĝas kapitalo tial, ĉar en la socio estas homamaso posedanta nenian produktadrimedon. Tiuj homoj — proletoj — devas vendi sian laborforton. Dungante laboristojn, la kapitalisto laborigas ilin en sia industriejo kaj pagas al ili la prezon de ilia laborforto en la formo de salajro. Laboristaro ricevas de la klaso kapitalista nur tiom, kiom necesas por la reproduktado de sia labora forto. La laborproduktiveco de laboristoj multe superas tiun normon. Sed ĉion, kion produktas la laboristo super sia salajro, faras profiton al la kapitalisto — posedanto de la produktadrimedoj. Vendante sur merkato varon la kapitalisto ricevas valoron, el kiu li kovras la valoron de konsumitaj por la produktado de varoj maŝinoj, iloj, materialoj, poste salajron de laboristoj, kaj post tio ankoraŭ restas certa valoraĵo — plusvaloro, ricevata de kapitalisto kiel profito.

Kiam estas deĉifrita la mekanismo de laborfortekspluatado, fariĝas klara, kiom nepacigeble malaj estas la interesoj de la laboristaro kaj la burĝaro. Ju pli multe daŭras la labortago, ju pli intensiva estas la laboro, des pli da plusvaloro sukcesas elpremi kapitalisto el la laboristo. Laŭ ekstera aspekto, laŭ la formo en la burĝa socio regas libereco kaj egaleco, sed fakte ekzistas dungsklavismo, kapitalisma punlaborejo por la tuta proletaro. La situacio de etaj produktantoj estas kelkfoje ankoraŭ pli malbona.

Studinte la tutan mekanismon de la produktado kaj varcirkulado en la kapitalisma socio, Marks montris, kiaj interrilatoj estas fakte kaŝitaj en la formoj de varinterŝanĝo, de monaj interrilatoj, salajro, profito ktp. Aplikante la metodon de dialeklika materialismo Marks montris, kiel la, esprimiĝantaj en la klasbatalo de proletaro kontraŭ la burĝaro, kontraŭecoj de kapitalismo neeviteble kondukas al la transformiĝo de kapitalismo je socialismo kaj komunismo. En sia verko «Kapitalo» farante konkludon el la amaso da kolektita materialo Marks diras, ke paralele kun la pliriĉiĝo de burĝaro unuaflanke, sur la alia flanko kreskas la mizero, jugo, subpremado, degenero kaj ekspluatado de la proletaro. Sed samtempe kreskas la ribelemo de tiu lasta, disvolviĝas ĝia klasbatalo, La privatposedo pri la produktadrimedoj fariĝas nekunekzistebla kun la alta progresnivelo de produktiveco kaj centralizigo. Neeviteble venas la socialisma revolucio.

La esenco de ekonomia teorio de Marks estas bonege kaj populare priskribita de li en broŝuroj «Dunglaboro kaj kapitalo», «Salajro, prezo kaj profito». En la vico de leteroj al Engels kaj al aliaj personoj estas klarigitaj la plej komplikaj problemoj de la ekonomia teorio. Fundamente ĝi estas traktata en la «Kapitalo». Tiun libron devas atente studi ĉiu deziranta fariĝi tute konscia komunisto.

Socialismo

Fine kelkajn vortojn pri la tria fonto kaj konsista parto de marksismo — s o c i a l i s m o [1]. Ĉi tie la antaŭuloj

[1] Socialismo estas la unua ŝtupo de kreskanta el kapitalismo nova socio, kiam ĉiuj fortoj de socialisma produktado ne atingis ankoraŭ pl nan disvolvon. La komunismo estas la sekvonta, pli alta ŝtupo, kiam la produktadfortoj jam disvolviĝis kaj kiam ĉiuj fontoj de sociaj riĉaĵoj ekfluas je abunda torento. Tiam, diris Engels, oni povas venki la malvastan horizonton de la burĝa juro kaj la socio povos skribi sur sia standardo: «De ĉiu—laŭ kapablo, al ĉiu—laŭ bezono».

de Marks estis utopi-socialistoj, kreintaj en sia imago bildon de estonta, ankoraŭ ne ekzistinta, idea'a socio kaj revintaj transiri al ĝi sen batalo kaj revolucio. Vivintaj en la fino de XVIII kaj unua duono de XIX jarcento francoj Sain-Simon kaj Fourie kaj anglo Robert Owen, observante la kontraŭecojn de kapitalismo, kreskon de mizero de vastaj amasoj samtempe kun la kresko de riĉeco kaj lukso de burĝaro, konkludis, ke la sola eliro el la iĝinta netolerebla situacio estas fari ĉiujn terareojn kaj produktad-rimedojn— fabrikojn kaj uzinojn — socia posedaĵo, anstataŭante multnombron de apartaj burĝaj mastrumoj per la organizado de unueca socia mastrumo kaj progresigante poste la socialisman produktadon.

Sed atingi la socialisman ordon utopiistoj projektis ne per klasbataloj, sed per konvinkigado de la kapitalistoj mem kaj de la kapitalismaj registaroj, t. e. per vojo paca. Tio estis ilia ĉefa eraro.

La socialistoj-utopiistoj vivis dum la tempo, kiam proletaro vegetis ankoraŭ en la plej kompatinda stato de subpremo. Ĝi ankoraŭ ne agis kiel memstara forto, kiel memstara batalanto pro sia afero. Sed en la utopioj de tre famaj socialistoj, kies nomoj estis supre cititaj, estis genieca antaŭvido, embrio de la proleta socialismo.

Malsame al la utopia socialismo la scienca komunismo bazigas la efektivigon de la socialisma ordo sur la klasbatalo de la proletaro, sur la venko de proleta revolucio. Por la kreo de socialismo necesas la diktaturo de la proletaro. La merito de Marks — iniciatinto de la teorio de scienca komunismo estas jeno: unue, li konstatis, ke la socialismo ne estas efektivigebla sen revolucio, kaj due, li montris la proletaron kiel la forton neeviteble efektivigontan la socialismon. Dank'al sia pozicio en la produktado kaj socio, la proletaro ne povas ne aspiri al fondigo de tia socia ordo, en kiu ne estos klasoj kaj en kiu ĉiu ekspluatado estos forigita. La kompletan konscion

pri tiu neceso la tuta proletaro povas eĉ ne havi, sed poiom ĝi nepre venos al tiu konscio dum la plenumado de tiu tasko mem, ĉar tio estas definata de la tuta ekzistanta situacio. Estante malamiko de la lasta formo de ekspluatado — dungsklavismo — la proletaro batalas kontraŭ ĝi kaj per tio same batalas ĝenerale kontraŭ ĉiuj formoj de ekspluatado. Tial la proletaro estas natura gvidanto de ĉiuj subpremataj kaj ekspluatatoj. Laŭ la opinio de Marks la taskoj de komunistoj estas ne la elpensado per menso de la plej bona, ideala sociordo, sed helpado al la laboristoj efektivigi tion, kion ili neeviteble devas efektivigi. Komunistoj devas gvidi la batalon de la proletaro. Detrui la ekspluatadon povas nur tiuj, kiuj mem ĝin suferas. La liberigo de laboristaro estas la afero de laboristaro mem. La komunismo sen interligo kun la vera amasa movado estas senenhava labilado.

Sed la definitiva forigo de la sklava jugo estas tre komplika kaj malfacila tasko. Ĝi kaŭzas furiozan, sovaĝan kontraŭagon de la ekspluatantaro. Forigi la ekspluatadon devas la amasoj mem kaj la revolucio estas neevitebla.

> «La revolucio necesas — skribis Marks en la jaro 1846 — ne nur pro la neeblo per iu alia rimedo detronigi la klason regantan, sed ankaŭ pro tio, ke la klaso detroniganta nur en la revolucio povas sin purigi de malpuraĵoj de la malnova socio kaj fariĝi kapabla krei la socion novan».

Necesas tuta historia periodo por plenumi la gigantan taskon de la konstruado de komunismo. En la jaro 1850 Marks diris al laboristoj:

> «Vi devas travivi 15, 20, 50 jarojn da civitmilito kaj bataloj de popoloj ne nur por transformi la sociordon, sed por transformi vin mem kaj fari vin kapablaj por la politika regado».

Krom la furioza kontraŭbatalo de la ekspluatantaro oni devas venki ankaŭ la fortön de tradicioj de la eta produktado tie, kie ĝi ankoraŭ konserviĝis, de la eta privatposedo, oni devas krei ankoraŭ neviditajn en la historio de la homsocio organizaĵojn.

Por ĉio ĉi necesas firma, centralizita gvidado kaj, dum ne formortas la klasoj, — ŝtata potenco. La formo de l'ŝtato de tiu ĉi transira de kapitalismo al socialismo periodo, kiel montris Marks, estas la proleta diktaturo.

Jena estas la ĝenerala konturo de la instruo de Marks, aplikinta sian metodon de dialektika materialismo por la solvo de problemo pri la kreo de socialisma sociordo. La esenco de konceptoj de Marks pri ĉi temo estas plej koncize priskribita en la «Komunista Manifesto», kiu devas esti surtabla libro de ĉiu konscia laboristo.

MARKS KIEL GVIDANTO DE LA PROLETARO LA SORTO DE MARKSISMO

Tuj post eltrovo de la historia rolo de la laboristaro Marks kaj Engels aliĝinte al la laborista movado komencis konvinkadi laboristojn pri la ĝusteco de siaj teorioj. Ili komprenis, ke nur la propra sperto de laboristoj, ellaborita en iliaj propraj agoj, eraroj, malvenkoj kaj sukcesoj devas krei en la laboristaro ĝustan koncepton. Marks kaj Engels batalis kontraŭ la malamikecaj teorioj de etburĝa anarkismo, ne komprenanta la tutan signifon de revolucia ŝtatpotenco (Prudon[1], Bakunin[2]) kontraŭ la etburĝa oportunismo (Lui Blan[3] kaj aliaj etburĝaj socialistoj), revintaj pri la forigo de ĉiuj mizeroj kaj malbonoj per metodoj pacaj, kaj ankaŭ kontraŭ la taktiko de komploto, izolita de l'amaso (Blanki[4]).

En la jaroj 80—90-aj de la XIX jarcento marksismo konkeris al si influon en laboristaro en la tuta mondo, ĉar nur la marksisma koncepto profunde ĝuste respegulis la efektivan staton de la laboristaro kaj indikis la verajn

premisojn de ĝia liberiĝo. Gvidante la batalon de la laboristaro, Marks fondis la I Internacion (1864—1872), la unuan internacian amasan organizaĵon de la laboristaro, kiun li gvidis en la spirito de sia revolucia teorio. La sperto, kolektita tiutempe kaj formuligita en la decidoj de kongresoj kaj rezolucioj de kunsidoj de Ĝenerala konsilantaro de la I Internacio devas esti atenteme studata.

Malgraŭ la teoria venko de marksismo, la malamikecaj al laboristaro instruoj ne malaperis. Ili nur aliformiĝis. La burĝaro ekpenadis subigi la proletaron al sia influo per alia vojo, nome per la vojo de fuŝado de la marksismo.

Aperis la tiel nomata reviziismo — fluo, postulanta revizion de la fundamentaj tezoj de marksismo. Ĉi fluo, aspektece agnoskante la ĝustecon de la Marks'a teorio, renaskigadis la etburĝajn teoriojn pri la paca enkresko de la kapitalismo en socialismon, pruvante la malneceson de revolucio.

Kiel rezulto de tio, en la 90-aj jaroj de la XIX jarcento kaj en la unua dekjaro de la XX jarcento inter la marksanoj disvolviĝis disputoj pri la vico da konkretaj temoj: pri la filozofio, pri ekonomia teorio, pri la agrara problemo pri la problemoj de taktiko ktp. Formiĝis du fluoj: 1) alo de ortodoksaj marksanoj, kiuj defendis la teorion de revolucia marksismo en tiu senco, en kiu ĝi estis kreita kaj aplikata de Marks kaj Engels, kaj 2) alo de oportunistoj, reviziantaj la Marks'an instruon pri la neevitebleco de la klasbatalo, pri la neevitebla krako de kapitalismo kaj neevitebleco de revolucio. La oportunistoj rezignas la dialektikan metodon de Marks kaj materialismon, transirante al la filozofio, de Kant, kiu estas adaptita al allaso de dioekzisto, al la pacigo de scienco kun la religio. La plej eminenta reprezentanto de tia «revizionismo» estis (kaj estas ĝis nun) en Germanio — E. Bernŝtejn [5], en Rusio — Struve [6] k. a.

La batalo por revolucia marksismo estis gvidata en la II Internacio daŭre kaj persiste. Poiom iĝis tia situacio

ke la gvidrolon en tiu batalo okupis bolŝevismo (leninismo) sub la gvidado de Lenin, kiu sukcesis savi de la fuŝado la revolucian metodon de Marks kaj ĝuste solvi la novajn, de la vivo starigitajn, problemojn. La problemoj pri la imperialismo, pri la rilato al imperialisma milito, pri la rilatoj inter la proletaro kaj kamparanaro en la burĝa kaj proleta revolucioj, pri la kunigo de batalo de la proletaro kun batalo de milioncentoj da subpremataj nacioj en landoj koloniaj kaj duonkoloniaj, pri la taskoj de la proleta revolucio, pri la proleta diktaturo kaj aliaj problemoj — ĉiuj ĉi problemoj tute laŭnove ekstaris kaj estis solvitaj de leninismo en la spirito de revolucia marksismo.

LENINISMO KAJ ĜIA NASKIĜO.

La avangarda rolo de leninismo estis kaŭzita de tio, ke pro la specifoj de la progresado de Rusio nome en ĝis la plej revoluciaj cirkonstancoj, kondukintaj al la neordinarforte revolucia eksplodo.

La burĝe-demokrateca revolucio, t. e. revolucio kontraŭ la servuto kaj absolutismo en Rusio, okazis en la epoko, kiam la kapitalismo jam atingis altan ŝtupon de sia evoluado. Nek unu burĝa revokucio okazis kun partoreno de tiom forta proletaro, kia estis la rusa en la jero 1905. La estinta en Rusio kunekzisto de progresinta kapitalismo kun la restaĵoj de feŭdalismo faris specifan kombinon de du klasaj militoj: de la kamparanoj kontraŭ la bienularo kaj de la proletaro kontraŭ la burĝaro.

En Rusio estis precipe kruela la jugo de absolutismo (ĝendarmaro, polico), de la bienuloj, kaj ankaŭ de kulakoj kaj kapitalistoj. Ju pli furioza estis la jugo des pli hardiĝis kaj edukiĝis en la daŭra batalo kontraŭ tiu jugo la partia gvidantaro kaj la amaso mem. En la cirkonstancoj de revolucia batalo speciale precize estis elforĝita la revolucia teorio des pli, ke al la tempo, kiam en Rusio maturĝis la revolucio, en Okcidento jam estis kolektita grandega revo-

lucia sperto. La definitive formiĝinta marksisma teorio estis elprovita en daŭra revolucia batalo kaj estis pruvita ĝia ĝusteco. La specifo de la rusia situacio estis tio, ke, kiam alvenis la revolucio (1905) la gvida rolo en ĝi estis konkerita de proletaro. La burĝaro aperigis kompletan senkapablon gvidi la batalon de amasoj kontraŭ la absolutismo. Konsiderante la ĉefajn fortojn de l'revolucio, Lenin en la jaro 1905 starigis lozungon de «revolucie-demokrateca diktaturo de proletaro kaj kamparanaro». En batalo kaj venko de ĉi du klasoj Lenin vidis la solan garantion por la venko de revolucio, antaŭ kiu staris unuavice burĝe-demokratecaj taskoj — detrui la servuton kaj absolutismon, forigi la bienulan terposedadon, neniigi la kastismon k. t. p. Lenin precize montris la konsekvon de ŝtupoj, tra kiuj devas pasi la revolucio. En sia broŝuro «Du taktikoj» (dum somero de la 1905 j.) li skribis:

> «La proletaro devas gvidi ĝis la fino la demokratisman revolucion, aligante al si la kamparanamason, por frakasi perforte la absolutismon kaj paralizi la hezitemon de la burĝaro. La proletaro devas fari socialisman revolucion, aligante al si amason de duonproletaj partoj de la loĝantaro, por venki perforte la kontraŭstaron de burĝaro kaj paralizi la hezitemon de la kamparanaro kaj etburĝaro».

Komence la revolucio estas direktata kontraŭ la servuto, kontraŭ bienula regado, kaj tiam la kondiĉo de ĝia venko estas revolucie-demokrateca diktaturo de proletaro kaj kamparanaro. Post tio ĝi estas direktata kontraŭ dungsklavismo, kontraŭ regado de la burĝaro, kaj tiam la nepra kondiĉo de venko de revolucio estas diktaturo de proletaro. Tiaj estis la ĝeneralaj tezoj de leninsmo. Tiudirekte ĝi donis ankaŭ solvon al diversaj problemoj, ekstarinkaj antaŭ revolucia proletaro. La solvo, donitaj de leninismo estis kontrilitaj kaj atestitaj kiel ĝustaj dum la revolucio de 1905 j., dum la Februara revolucio de la 1917 jaro, kaj dum la grandioza unua proleta revolucio en Oktobro de la 1917 jaro kaj plue.

Ni jam supre diris, ke la bazo sur kiu kreskis leninismo, diferenciĝas de tiu, sur kiu kreskis kaj formiĝis marksismo nur per la specifoj de historia periodo. La marksismo formiĝis kaj disvolviĝis dum la regado de industria kapitalismo, kiam la epoko de pure burĝaj revolucioj en Eŭropo ĝenerale finiĝis kaj evidentiĝis la neevitebleco de proletrevolucio. Kaj linenismo estas marksismo de ankoraŭ pli matura epoko, de epoko de imperialismo kaj proleta revolucio, kiel difinas la programo de Komintern.

Rilate al la teorio la tuta leninismo estas konstruita sur la fundamento de revolucia marksismo, sur la marksismo de Marks kaj Engels, purigata de la fuŝaĵoj de oportunistoj kaj teoriuloj de la nuntempa II Intertacio. Ĉi teoriuloj montriĝis tute sur la flanko de la burĝaro kaj fariĝis agentoj de kapitalistoj en laborkiasa medio. La ĉefa kaŭzo de oportunismo estas korupto flanke de la kapitalistoj de la supro de la klaso per superprofitoj, ricevataj de malnovaj kapitalistaj kulturlandoj —Anglio, Francio, Germanio, USA, k. a. — el rabado de aziaj kaj afrikaj k. t. p. koloniaj kaj duonkoloniaj landoj, el rabado farata de l' uzurpa financa kapitalo, kiu garantis al si monopolion, t. e. aŭtokratan uzurpon de tutaj branĉoj de la industrio.

KION NOVAN DONIS LENINISMO.

Leninsmo havas la saman bazon, la samajn konsistajn partojn, kiel marksismo. Sed la nova epoko, stariginte novajn problemojn, postulis ke la marksisma metodo estu aplikata al la solvo de novaj problemoj kaj donu solvojn, speciale akomoditajn al la novaj kondiĉoj. La metodo estas antaŭa, sama kiel ĉe Marks kaj Engels, la situacio estas alia.

Marksismo fondis dialektikan materialismon. Reviziismuloj ĝin fuŝis. Lenin, restante fidela al Marks'a metodo, plej konsekvence sekvis en tuta sia teotia kaj prak-

tika laboro la regulon: ne halti ĉe ĝeneralaj tezoj, ne akcepti kiel ĉiam taŭgan ŝablonon tion, kion diris Marks akomode al cirkonstancoj kaj situacio de sia tempo, sed per detala pristudo de ĉiuj specifoj de la nuna nova stato de sociaj interrilatoj—ellabori specialajn decidojn, respegulantajn ĉiujn specifojn ĝuste de ĉi nunaj cirkonstancoj. «Teorio marksisma ne estas dogmo, (t. e. ne estas intruo ellernata parkere kiel preĝo), sed gvido por agado», neunufoje diris Lenin. Li opiniis, ke per ĉi vortoj de Engels tre trafe estas esprimata la esenco de revolucia marksisma teorio.

Akcentante la gravecon de prikonsidero de ĉiuj specifoj de nuna momento, Lenin ĉiam apartigis la plej gravan kaj ĉefan kaj parolis pri la ĉefa ero de l'ĉeno», kiun oni devas ekpreni por teni la tutan ĉenon. En la tuta sia agado Lenin plej bone ol iu ajn el marksanoj scipovis aplikadi materialisman dialektikon kaj insutruis tion al aliaj.

Ankaŭ sur la kampo filozofia Lenin povis krei novon. En sia libro «Imperialismo kaj empiriokriticismo» li donis en la spirito de dialektika materialismo memstaran solvon por novaj problemoj, starigitaj de la progresado de naturscienco (ĉefe de fiziko). Dum 30 jaroj, pasintaj de tiam, kiam Engels skribis sian libron «Anti-Düring», naturscienco sukcesis malproksiman antaŭenmarŝi.

Sur la kampo de politika ekonomio Marks esploris la industrian kapitalismon. Ĝi estas tiu ŝtupo en la evoluado de kapitalismo, dum kiu precipe rapide (kvankam ne kviete, kun embarasoj kaj krizoj) kreskas la granda permaŝina industrio. La distinga trajto de ĉi ŝtupo estas progresado de libera konkurenco, rapida disvolviĝo de permaŝina produktado.

La premiso de tia disvolviĝo estas ekzisto de necesa merkato, kie estas vendeblaj la varoj, produktataj de la

granda permaŝina industrio, formanĝanta sur la bazo de libera konkurenco etproduktadon (la forta kaj granda kapitalo venkas la etproduktantojn). La XIX jarcento estis epoko de la regado de industria kapitalismo, kiu rapide progresis komence en Britio, poste en aliaj landoj eŭropaj kaj en U.S.A. Ĝis ekzistis libere plenigeblaj je nemultekostaj varoj merkatspacoj, la kapitalismo havis ĝenerale libereman spiriton. Al la fino de la XIX-a kaj komenco de la XX-a jarento alvenis la epoko de la imperialismo — regado de uzura, banka, financa kapitalo. Lenin havis aferon kun ĉi nova imperialisma ŝtupo en la evoluado de kapitalismo, kaj li donis la teotion de imperialismo. En speciala libro kaj kelkaj broŝuroj Lenin bone lumigis kaj klarigis la specifojn de ĉi nova ŝtupo en evoluado de la kapitalismo kaj montris, ke imperialismo estas monopolisma kapitalismo, parazitisma aŭ putranta kapitalismo, matura por proleta revolucio. Imperialismo, laŭ difino de Lenin, estas kapitalismo sur tia ŝtupo de evoluado, kiam la kuniĝo de grandampleksa produktado kaj de la kapitalo en la mano de areto da grandkapitalistoj atingas tian gradon, ke fondiĝas monopoloj, efektiviĝas kuniĝo de la banka (financa) kapitalo kun la industria kaj kiam efektiviĝas regado de banka kapitalo super la industria. El landoj de malnova kapitalisma kulturo (Eŭropo kaj Nordameriko) oni komencis eksportadi kapitalon en landojn koloniajn kaj duonkoloniajn (Azio, Afriko). Samtempe kun la eksporto de varoj, produktitaj en grandkapitalismaj landoj, la kapitalistoj de malnovaj kapitalismaj landoj komencis konstrui en postrestaj malpli progresintaj landoj ĉiam pli kaj pli da industriejoj surloke, prilaborantaj la krudaĵon per malpli alte pagata laboro de indiĝenaj laboristoj. Komencis fondiĝi internaciaj monopolaj unioj kapitalistaj, dividantaj inter si la tutan mondon. Ĉiu spaco sur la terglobo estis uzurpita de tiu aŭ alia imperialisma ŝtato. Sur ĉi bazo neevitebla estas la konkurso inter grandaj uzurpuloj, rezulte sekvata de detruigaj, sangozaj, de ĉiuj landoj partoprenataj militoj—

la mondmilitoj. La unua el ili estis la milito de 1914—1918 j.j.

«La imperialismo komplikigas kaj akrigas la kontraŭecojn de kapitalismo,— diris Lenin, — «interplektas» la liberan konkurencon kun monopoleco, sed forigi la interŝanĝon, la merkaton, konkurencon, krizojn k. t. p. la imperialismo ne povas. Imperialismo estas vivfinanta, sed ne vivfininta kapitalismo, estas mortanta, sed ne mortinta. Ne puraj monopoloj, sed monopoloj apud interŝanĝo, merkato, konkurenco, krizoj, — jen estas la specifo de imperialismo ĝenerale».

Mortigi la imperialismon devas la prolet-revolucio, ĝi mem ne mortos. La ĉefaj verkoj de Lenin pri ĉi problemo estas: «Imperialismo kaj skismo de socialismo» kaj »Imperialismo kiel plej nova evoluadŝtupo de kapitalismo».

Defendante kreitan de Marks revolucian teorion de klasbatalo, Lenin donis en disvolvita formo instruon pri la proleta diktaturo, montrinte la kreitan dum rusa revolucio s o v e t a n fotmon de ŝtato, kiel la faktan efektivigadon de Marks'a ideo pri proleta revolucio.

Marks montris la ĝenera'an direkton de l'vojo al socialismo tra revolucio, tra klasbatalo kun proleta hegemonio. Lenin havis taskon g v i d i l a proletrevolucion en realo okazantan, organizi ĝin, akceli ĝian venkon, organizi ĝian sindefendon, gvidi la konstruadon de socialismo. En siaj verkoj li donis dosvolvitan instruon pri proletrevolucio, pri proleta diktaturo, pri konstruado de socialismo, pri rilatoj inter proletaro kaj kamparanaro dum diversaj evoluadŝtupoj de la socialisma revolucio, instruon pri premisoj de ĝia progresado kaj pri neniigo de la klasoj per la klasbatalo.

LENIN KIEL GVIDANTO DE LA PROLETARO

Ĉiuflanke prikonsiderante la tutan komplikecon de la aliiĝanta cirkonstancaro kiel enlande, same en la sfero in-

ternacia, Lenin genie skizis la aktualajn taskojn kaj batalis kontraŭ ĉiuspecaj deflankiĝoj de la principoj de revolucia marksismo. Li batalis kontraŭ la rektegvidanta al kapitulacio antaŭ la burĝaro menŝevika dekstroportunismo, kontraŭ trockisma «maldekstruma» frazo kaj kontraŭ aliaj similaj fluoj, same akcelantaj la rezignon de la batalo kontraŭ burĝaro kaj forigon de l'amasoj. Lenin mem en la j. 1920 en broŝuro «Infana malsano de maldekstrumo en la komunismo» detale rakontis en unu el ĉapitroj pri tio, kiel evoluis bolŝevismo (leninismo), en batalo kontraŭ kiaj internaj malamikoj de laborista movado ĝi kreskis, fortiĝis kaj hardiĝis. En ĉi broŝuro Lenin resumis la strategion kaj taktikon de leninismo — revolucia marksismo.

Gvidante la batalon de laboristaro, Lenin en la jaroj 90-aj—900-aj montris kiel ĉefan taskon, — kiel «ĉ e f a n e r o n d e l a ĉ e n o» — la fondigon de firma mallegala organizaĵo de p r o f e s i a j r e v o l u c i u l o j. Dum la revolucio de 1905 la ĉefa tasko de li montrita konsistis en aranĝo de revoluci-demokratisma d i k t a t u r o d e p r o l e t a r o k a j k a m p a r a n a r o: dum la jaroj de reakcio kaj antaŭ milito de 1914 j. tia tasko estis — konservo de m a l l e g a l a p a r t i - o r g a n i z a ĵ o k a j k u n i g o d e l e g a l a l a b o r o k u n m a l l e g a l a. Dum imperialisma milito Lenin starigis taskon: t r a n s f o r m i ĉ i u z u r p a n m i l i t o n j e m i l i t o i n t e r k l a s a — de proletaro kontraŭ la burĝaro (unuavice kontraŭ sia patria burĝaro); en la jaro 1917 — m i l i t a k i r o d e l a ŝ t a t p o t e n c o d e p e r l a p r o l e t a r o kaj post la fino de interklasa milito — i n d u s t r i g a d o d e l a l a n d o k a j k o n s t r u a d o d e l a s o c i a l i s m o deper proletaro kune kun la pleja parto de la kamparanaro.

La sukcesoj kaj venkoj de nia revolucio dependis antaŭ ĉio de tio, ke ĉi grandioza revolucio levis al konscia agado neviditan multegon da batalantoj kaj naskis neordinaran vervon kaj entuziasmon de l'amasoj. Sed tiaj sukcesoj ne

ebius sen konforma gvidado al tiuj amasoj. Ĉi gvidadon efektivigadis Lenin per komunista partio, formiĝinta dum antaŭirintaj la Oktobran revolucion jardekoj. Lenin edukis ĉi partion, intime kunligis ĝin kun amasoj de la laboristaro, instruinte ĝin gvidi sin per la teorio kaj metodo de revolucia marksismo. En la nombro de siaj verkoj li plupro-gresigis kaj perfektigis la Marks'an instruon pri partio. Lenin estis plej bona, genieca gvidanto de la nuntempa proletaro, esprimanto de ĝia nerompebla decidemo frakasi la jugon de ekspluatado kaj permiliti komunismon. Li ankaŭ kreis internacian partion de l'komunismo — gvidantan la batalon de la proletaro kaj de ĉiuj subpremato de la mondo — la Komunisman Internacion.

Post la morto de Lenin la gvidantaro de TSKP (Tutsovetia Komunista-partio) kaj de Kominterno, ĝuste sekvante leninismon, gvidas la laboristaron kaj kamparanamasojn al la venko kaj perbatalo de la komunismo en tutmondo. Kiajn ajn malfacilaĵojn ni ankoraŭ renkontu, ni ĉiuj devas apliki ĉiujn fortojn por atingi ĉi celon, konscie partoprenante la pritraktadon de partidecidoj, kun plena konvinko pri ĝusteco de skizata de l'partio vojo kaj pri neeviteblo de finvenko. Ĉiun baron venkos sub gvidado de Lenin-partio sub la standardo de leninismo la forto de aliĝantaj al batalo kaj krea laboro novaj kaj novaj milionoj da proletoj kaj laboruloj.

Klarigo de kelkaj nomoj

[1] P r u d o n (1809—1865) estis etburĝa teoriulo-ekonomiisto, teoriulo de anarkismo. Li kritikis kapitalismon el la vidpunkto de et-kamparano, kaj posto de et-burĝo. Li ne povis imagi al si alian socion, krom socio de varproduktantoj. Li negative rilatis al ŝtato (defendanta la interesojn de grandkapitalo). Li starigis atestantajn lian kompletan nekomprenon de la esenco de kapitalismaj rilatoj projektojn pri senpaga kredito, pri reciproka helpo de laboristoj kaj metiistoj (Vidu leterojn de M a r k s kaj E n g e l s pri Prudon, eld 3-a).

[2] B a k u n i n (1814—1876) estis unu el la teoriuloj de la anarkismo. Laŭ la karakterizo de Marks, Bakunin intermiksadis la ideojn de Prudon (negativa rilato al la ŝtato) kun ideoj de «La Komunista manifesto». Li opiniis, ke kapitalo estas kreita de la ŝtato (sed ne inverse). Li predikis rezignon de la politiko, dirante, ke oni devas «propagandi, diskreditigi la ŝtaton, organizîĝi, kaj, kiam finfine oni havos en siaj vicoj ĉiujn laboristojn, sekve la plimulton, tiam foriĝos ĉiuj ŝtatinstitucioj kaj ilian lokon okupos la organizaĵoj de l'Internacio. (Engels. Letero al Kuno, 1872 j.). La teorioj de anarkismo atestas pri kompleta nekompreno deper iliaj autoroj de la esenco de kapitalismaj rilatoj, nekomprenon de tio, ke neeblas likvidi kapitalismon kaj krei socialisman produktadon sen proleta diktaturo, sen centralizo kaj severa disciplino. La anarkismo estas modela etburĝa ideologio. La bazo de anarkismo estas etburĝa medio.

[3] L u i B l a n (1811—1882) estis reprezentanto de etburĝa socialismo predikanta ne batalon, sed kunlaboradon de la klasoj. La etburĝa socialismo (kapitulaciismo) penadas plibonigi kaj korekti per reformoj (flikado de breĉoj) la burĝan socion. Pervorte agnoskante la socialisman idealon, li ne nur nenion faris por ĝia re ligo, sed deigante proletaron de revolucio, fakte defendadis la burĝan sociordon kontraŭ la ebleco de ĝia detruo flanke de la proletaro. Per tio sama ĝi servis al burĝaro.

[4] B l a n k i (1805—1881) estis fama franca revoluciulo-komunisto. De la frua junaĝo li aktive partoprenis la revolucian movadon, estis partoprenanto de konspiraj revoluciaj asocioj. Li partoprenis kelkajn revoluciajn eksplodojn, kelkfoje estis vundita, arestita, estis kondamnita al morto kaj daŭra enkarcerigo. Li estis adepto de la konspira taktiko (sen kunligo kun amasa

movado) por la konkero de la ŝtatpotenco kaj por aranĝo de komunisma revolucio desupre, per la dekretoj de revolucia registaro. Blanki estis reprezentanto de antaŭmarksa komunismo.

[5] B e r n ŝ t e i n (naskiĝis en 1850 j.) estas germana socialdemokrato, estinta lernanto kaj kunlaboranto de Engels. Post la morto de Engels li publikigis artikolojn, reviziantajn la filozofiajn, ekonomiajn kaj politikajn bazojn de revolucia marksismo. Li estis aŭtoro de teorio pri klasa interpaciĝo kaj paca «enkresko» de kapitalismo en la socialismon.

[6] S t r u v e (naskiĝis en 1870) en 90-aj jaroj estis marksano, sed jam en fruaj siaj verkoj li aperigis emon limigi kaj fuŝi marksismon akomodante ĝin al la bezonoj de la burĝaro. En la 900-aj jaroj li fariĝis liberalulo. Nun li estas blankelmigrinto.

ENHAVTABELO

Kio estas la scienca komunismo 3
Dialektika materialismo 4
Politika ekonomio 7
Socialismo 12
Marks kiel gvidanto 15
Leninismo kaj ĝia naskiĝo 17
Kion novan donis leninismo 19
Lenin kiel gvidanto 22
Klarigo de kelkaj vortoj 25

LEGINTE ĈI BROŜURON
TUJ ABONU

N. LENIN

ELEKTITAJ VERKOJ

en 16 volumoj
en esperanto

Petu la detalan prospekton:

„Ekrelo“, Löbauer Str. 35
Leipzig N 24 Germanio

Sovetianoj ricivos la prospekton ĉe CKSEU, sendante 10-kopekan poŝtmarkon:

Moskvo, Spiridonovka, 15

3233.9



„EKRELO“
Löbauerstr. 35
LEIPZIG N 24
Germanio